

# Internacia Fervojisto



Dumdonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)  
revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270



## 2022.4

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn




## La 73-a IFK Beroun, Ĉeĥio

## Estimataj gelegantoj,

Finfine post du jaroj ni havis denove eblecon renkontiĝi persone dum IFEF-kongreso. Laŭ multaj informoj, kiujn mi ricevis dum la kongreso aŭ poste, la gepartoprenantoj kun plezuro kaj kontento ĝuis la kongresan etoson. Ili povis ankaŭ persone prezenti siajn opiniojn pri diversaj aferoj, kiuj koncernas nian agadon. Tiu ebleco mankas aŭ estas malfacile realigi ĝin dum retkunvenoj. Unu el temoj, kiu vekis reagon estis ukraina flago, kiu aperis sur titoloĉapoj de nia revuo. Ĝi aperas tie kiel esprimo de simpatio kun lando, kiu estis obstine kaj maljuste atakata.

Alia temo estas projekto Verden. En nuntempa numero de IF estas artikolo (vidu lastan paĝon), kies celo estas klarigi motivojn kaj celojn de la projekto. Ĝi nun troviĝas en fazo kiam estas kunigitaj materialoj por prepari finan dokumenton – manlibron. Dum pasintaj monatoj ni ricevis ses kontribuaĵojn kaj ni atendas ankoraŭ plurajn. En tiu loko mi volas instigi vin, kiuj ankoraŭ ne reagis, sendu viajn rimarkojn al la enketilo. Ju pli da materialoj ni ricevos, des pli valora estos la rezulto.

Kun alvenantaj someraj monatoj mi deziras al vi agrablan kaj trankvilan somerumadon kaj refreŝiĝon.



Via redaktoro

**Enhavo:**

Salutvortoj por la 73-a IFK, <i>Beroun</i> , Ĉeĥio.....	68
Protokolo pri la publika komitatkunsido .....	71
Ĉasi krokodilojn en bohemiaj arbaroj.....	78
Postkongresaj tagoj (12.05. – 15.05.2022).....	82
Stato de la fervojo en norda Skandinavio (2-a parto) .....	85
Aŭklando bonigas siajn ligojn al flughaveno .....	87
Kio estas VERDEN?.....	87
Venontjara invito de BAFE .....	88

Titolpaĝo: Parto de partoprenantaro.

**Internacia Fervojisto**

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

**Estraro de IFEF**

**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) prezidantino@ifef.net

**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) sekretario@ifef.net

**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) kasisto@ifef.net

**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) redaktoro@ifef.net

**Gvidanto de la Faka Komisiono:** momente neokupita

**Membroj de la Redaktora Komisiono**

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

**Membroj de la Faka Komisiono**

Guido Brandenburg (Germanio), ts@ifef.net

Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), fas@ifef.net

**Bank-Konto:**

**Nomo:** „Laurent Vignaud”

**IBAN:** FR3320041010110929374Y03237

**BIC:** PSSTFRPPNTE

**UEA-konto:** iffk-o

**Retejo:** www.ifef.net

**Facebook:** <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

## Salutvortoj por la 73-a IFK, *Beroun*, Ĉeĥio

Solena inaŭguro, 07.05.2022



Karaj geamikoj,

Mi rememoras ke en la jaro 2011 kun granda emocio, por la unua fojo kiel prezidantino de IFEF, mi salutis la kongreson en Liberec. Nun, por la 73-a IFK, jam la kvaran fojon en Ĉeĥio (post 1991-*Olomouc*, 2001-*Tábor* kaj 2011-*Liberec*), ni renkontiĝas en *Beroun*, sed ĉifoje en tute aliaj cirkonstancoj.

Post du jaroj de pandemio, kiu malpermesis niajn fizikajn kunvenojn, la ĝojo revidi denove unu la alian estas grandega.

Kiel rimedoj perfektaj por kunlaboro inter homoj el diversaj landoj kaj kulturoj, eble ni ne sufiĉe akcentas, ke niaj kongresoj permesas plekti samtempe ne nur fakajn, sed daŭrajn realajn amikajn rilatojn trans landlimoj, des pli en krizaj tempoj.

Kiam mi komencis pripensi tiun tekston...ŝajne ke pasis jaroj de tiam...Eŭropo aspektis tute alie. La pandemio ŝanĝis la mondon en kiu ni vivas profesie, ekonomie kaj socie. Ĝuste kiam proksimiĝas ĝia fino, alian lecionon ni ricevas: ke ĉiam ni devas esti pretaj por la ne-antaŭvidito. Eŭropo malkovras per nova tragedio, tiu de Ukrainio, la malfortikecon de paco, pri kiu ĝis nun ni opiniis esti eterna kaj ne-inversigebla. Estis al mi neimageble pensi antaŭ kelka tempo, ke mi skribus ĉi tiujn liniojn en nova realo, eĉ pli drama ol la pandemio.

Kiel ajna drama evento, precipe kiam ĝi estas proksima al ni kaj ni sentas ĝian spiron aktivigi niajn fortajn emociajn fontojn, la milito malkaŝas la malgrandecon sed ankaŭ la grandiozecon de la homaro.

Unuflanke la bildo, kiun ni vidas en la krizo de ukrainaj rifuĝintoj, temas pri bombardo de loĝejoj, malsanulejoj, pafado al civiluloj kaj detruo de monda heredaĵo...

Aliflanke, eble eĉ pli grava estas la mirinda solidareco kun kiu la rifuĝintoj estas gastigataj en tiom da landoj kaj urboj de Eŭropo, la varmo kun kiu tiaj traŭmatizitaj homoj estas akceptataj.

La nuna momento sukcesis krei senprecedencan komunan fronton por helpi la aliulojn.

Fervojo kaj fervojistoj estis ankaŭ el tiu vidpunkto en la unua linio! Preskaŭ ĉiuj landoj kaj fervojaj kompanioj proponis al la rifuĝintoj senpagajn naciajn kaj internaciajn trajnvojaĝojn. La vojaĝbiletoj havas kutime la aldonan mencion: "HELP UKRAINE".

Tiel ke nia devizo: „La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn!” restas daŭre aktuala en ĉiuj epokoj, en ĉiuj cirkonstancoj.

La leciono estas, ke ni povas fari miraklojn nur estante ŝultron ĉe ŝuldro, solidare, en familio en kiu trovas sian lokon kiel eble plej multe da valoraj homoj, tiel kiel estas nia esperantista familio, kies bazŝtono estas la interna ideo de humanisma internaciismo kaj mondskala solidareco.

Pro tio ni kune ĝuu denove la eblecon renkontiĝi kaj travivi amikecan etoson en tiu kongreso, pri kiu mi certas, ke la gvidado de lokaj spertuloj en organizado, la proponitaj fakaj, kulturaj kaj turismaj programeroj estas garantioj por altnivela kaj altkvalita aranĝo organizata de unu el la plej aktivaj niaj landaj asocioj.

Antaŭ fini mian saluton, en la nomo de IFEF, mi kore dankas niajn ĉeĥajn gekolegojn, kiuj pretis transpreni ĉi tiun ampleksan organizan taskon kune kun landa sekcio de FISAIC, kaj sincere gratulas LKK por fervora planado kaj preparado de tiu kongreso.

Mi deziras konkretigi tiujn dankojn per atribui al kelkaj inter ili la honorigajn diplomojn de IFEF – jam kutima momento dum solena inaŭguro.

**S-ro Petro Chrdle** – unu el la plej malnovaj kaj aktivaj membroj de la ĉeĥa landa asocio, kiu laboradis por disvastigo de la Esperanta kulturo per sia eldonejo KAVA-PECH, sed ankaŭ per la plurjara organizado de la prestiĝa konferenco KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), kiun IFEF partoprenis per aliĝo de pluraj siaj membroj kaj per prelegoj ĉu fakaj, ĉu alitemaj prezentitaj ĉiokaze.

**S-ro Jaroslav Matuška**, universitata instruisto en *Pardubice* kiu, diskrete sed ege kapable subtenis la fakan agadon de IFEF. Kune kun siaj studentoj organizis kaj organizos plurajn seminariojn kadre de la Teknika

Fakultato de *Pardubice*, faciligis subskribon de kunlabora kontrakto de IFEF kun tiu fakultato kaj laboradas en interfakaj projektoj kiel la nuna Verden, projekto financata de Eŭropa Komisiono. Jam tri junuloj gestudentoj kunlaboras en projekto kaj membriĝis en la ĉeĥa landa asocio.

**S-ro Ladislav Haki**, nuntempe anstataŭanto de ĉefkomitatano, ege aktiva koncerne la informadan flankon de nia federacio kaj unu el esperoj por nia estonta agado.

**S-ro Ondřej Šmehlík**, gvidanto de Internacia fako de Sindikata Asocio de Fervojistoj, kiu respondecas pri la organizado de tiu kongreso ĉefe per la plej malfacila flanko de iu ajn kongreso, la financa flanko. Li multege kaj plurflanke helpis LKK kaj meritas niajn dankojn.

Laste, sed la plej grave, **s-ino Anna Abelovská**, famkonata de ni ĉiuj pro sia sindona kaj nelaciĝanta plunjara subtenado de agado ne nur de la landa asocio, sed ankaŭ de nia federacio. Sen ŝia oferemo ne estus ebla nia ĉeesto ĉi tie, nek tiom da mirindaj kaj sukcesaj kongresoj kaj diversaj aliaj aranĝoj, kiuj jam okazis plurfoje en Ĉeĥio.

IFEF honorigas ŝin per Honora Membreco. Mi transdonas kun granda plezuro al s-ino Anna Abelovská la diplomon de Honora Membro de IFEF.

Ĉiuj honorigitoj meritas niajn dankojn kaj aplaŭdojn!

Post tiu emociiga momento, en la nomo de IFEF mi deziras sukcesajn, riĉigajn, klerigajn kaj amuzajn kongresajn tagojn dank' al proponitaj fakaj, kulturaj kaj turismaj programeroj.

Samtempe mi deziras, ke tiu kongreso plifortigu nian "familian fakan rondon". Eĉ se nia vivo neniam estos kiel antaŭ la pandemio aŭ ĉi tiu milito, ni restu kune!

Per tiuj vortoj mi deklaras la 73-an IFEF-kongreson malfermita.

**Rodica TODOR**, IFEF-prezidantino

**PROKOKOLO PRI LA PUBLIKA KOMITATKUNSIDO** (plenkunsido)La 73-a IFEF-kongreso en *Beroun* (CZ) 09.05.2022**I . F . E . F .**  
**Sekretariejo**Mallongigoj: Pr = prezidanto, Sk  
= sekretario, Ks = kasisto, Rd =  
redaktoro, e-o = estraro, Ĉk =  
ĉefkomitatano, anst Ĉk =anstataŭanto de Ĉk, IF = Internacia Fervojisto, FK = Faka  
Komisiono, TS = Terminara Sekcio, FAS = Fake Aplika Sekcio, Gv =  
gvidanto de FK, k-o = komitato, k-ano = komitatano, kk-ano =  
kromkomitatano, k-go = kolego, Hm = honora membro, Hp = honora  
prezidanto, l.a. = landa(j) asocio(j). (Landkodoj duliteraj, laŭ normo ISO  
3166)**1. Malfermo, konstato de la mandatoj**La Pr-ino Rodica Todor malfermas la kunsidon, salutas kaj bonvenigas  
la ĉeestantojn.Ĉeestas la estraranoj: Pr-ino Rodica TODOR (RO)  
Sk Vito TORNILLO (IT)  
Ks Laurent VIGNAUD (FR)  
Rd Ladislav KOVÁŘ (CZ) (en reta kunligo)  
Ĉk Zlatko HINŠT (HR)

La Sk laŭstatute alvokas la rajtigitojn kaj listkalkulas la ĉeestantojn.

	Lando	Kodo	Komitatano	
01	Aŭstrio	AT	Ernst QUIETENSKY	neniu
02	Belgio	BE	Marc CUFFEZ	
03	Bulgario	BG	Petia ALEKSANDROVA	neniu
04	Ĉeĥio	CZ	Ladislav HAKL	
05	Ĉinio	CN	Tianyi WANG (Chielismo)	neniu
06	Francio	FR	Christian DARDENNE	
07	Germanio	DE	Bodo EHRlich	
08	Germanio 2	DE	Guido BRANDENBURG	
09	Hispanio	ES	Carlos SPINOLA	neniu
10	Hungario	HU	István GULYÁS	neniu

11	Italio	IT	Vito TORNILLO	
12	Kroatio	HR	Zlatko HINŠT	
13	Pollando	PL	Wiesław LIBNER	
14	Rumanio	RO	Rodica GIUHAT	
15	Slovenio	SI	Karl KOVAČ	neniu
ĈEESTO de 8 LA rajtas 9 komitatanoj				

## 2. Ricevitaj mesaĝoj.

Mesaĝoj estis legataj dum la solena malfermo.

- Honora Prezidanto Romano Bolognesi sendis mesaĝon pere de la Sk, transdonita dum la salutoj en la inaŭguro.
- Bulgara Fervojista Esperanta Sekcio (BFES) sendis salutmesaĝon per e-poŝto subskribita de ĝia prezidantino Petia Aleksandrova.
- Fakkomitato de Fervojistoj Esperantistoj en Slovenio.
- HAFE sendis e-mesaĝon por saluti la kongreson nome de la prezidanto Carlos Spinola.

## 3. Honorigo al la mortintoj

La Sk legas la nomojn de la mortintoj, pri kiuj oni eksciis de la 72-a IFK-reta, 2021 ĝis la 73-a IFK-Beroun, 2022. Oni honorigas ilin per unuminuta silento; ili ripozu pace.

Lando	Antaŭ-nomo	Familia nomo	Naskiĝdato	Mortdato	Aĝo	Menciindaĵo
Aŭstrio	Helmut	ORTNER	03.07.1958	2022	64	
Ĉeĥio	Milada	DOBŘICKÁ	12.02.1948	16.2.2021	73	
Ĉeĥio	Ladislav	ČÁSTEČKA	31.05.1947	04.03.2022	75	
Kroatio	Štefica	OREŠKOVIČ	14.10.1934	23.02.2022	87	
Francio	Simone	BAUDELLOT	1933	2021	88	Iama sekretario de FFEA
Germanio	Annelies	RUDOLF	07.07.1942	25.09.2021	79	
Rumanio	Niculina	IACOB	07.04.1951	29.11.2021	70	REFA-kasistino
Slovenio	Jovan	MIRKOVIČ	05.10.1935	.. 04.2022	86	Prezidanto de Slovena Fervojista Landa Asocio dum pluraj jaroj.

## 4. Estraranaj raportoj

### 4.1. Sekretario

La Sk legas resuman raporton. La raporto aperis en IF 2022.3. Neniu demando, nek rimarko.



Raporto aprobita.

#### **4.2. Redaktoro**

La Rd resumas la raporton kiu aperis en IF 2022.2. Li informas ke la eldono kaj sendado de la bultenoj estis regule faritaj. En la jaro 2021 aperis entute 6 numerojn de la revuo Internacia Fervojisto kun entute 120 paĝoj (128 paĝoj en la jaro 2020) kaj 70 artikoloj aŭ raportoj, sciigoj ktp.

Je la enhavo de pasintjara kolekto de la Internacia Fervojisto partoprenis 16 aŭtoroj.

Raporto aprobita.

Dum la prezentado oni klarigis ankaŭ pri la projekto „Erasmus+ Verden” pri kiu multaj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estis enplektitaj, ne bone komprenis la celon.

#### **4.3. Kasisto**

La Ks prezentas la tabelojn de la kalkuloj kaj la kasistan raporton kiuj aperis en IF 2022-2.

Raporto aprobita.

#### **5. Diskuto kasraporto-bilanco 2021/buĝeto 2023, kotizkonfirmo**

Estas konfirmataj la du membrotizoj: 9 eŭroj por reta sendo de la revuo, kaj 15 eŭroj por papera sendo de la revuo. Raporto aprobita.

#### **6. Protokolo de la reta komitatkunsido 2021**

La k-anoj kaj respondeculoj de l.a. ricevis la protokolon, ĝi aperis ankaŭ en IF. Unuanime aprobita.

#### **7. Raporto de la ĉefkomitatano**

La Ĉk legas la raporton. La Ĉk plendas pro malfruo de sendo de la jarraportoj de l.a., pri kiuj al kelkaj li devis instigi plurfoje, sensukcese. Neniu komento. Raporto aprobita.

#### **8. Resumo de la jarraportoj 2021 el la landaj asocioj**

La Sk resumas la raporton, ĝi aperos en nia revuo “Internacia Fervojisto” n-ro 2022-4. Pro la fakto ke kelkaj l.a. ne raportis akurate laŭ la demandilo sendita de la Ĉk, kelkaj statistikoj ne reprezentas precize la IFEF situacion.

Raporto aprobita.

#### **9. Situacio en kelkaj landoj**

La legado de la resuma raporto de landaj asocioj evidentigis la rilatojn

kun kelkaj asocioj, multaj ne respondas kaj ne donas sufiĉajn informojn pri la agado. Oni devis decidi ankaŭ pri la restado de Ĉinio en IFEF, ĉar ĝis nun ne estis pagitaj la membro-kotizoj de la jaro 2021 kaj 2022, kvankam ĝi estis invitita plurfoje realiĝi al IFEF. Laŭstatute se ili ne pagos la membro-kotizojn ĝis la fino de majo, ekde la unua de junio ne plu estos membroj de IFEF.

## **10. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)**

### **10.1 Sekretario de la Fake Aplika Sekcio (FAS)**

En la jaro 2021 estis preparita la 30-a numero de FFK kun 9 artikoloj de 10 aŭtoroj el 5 landoj, sed pro tempomanko ne estas printita. Post la printo estos sendita kune kun IF4. FFK 30 enhavas prelegetojn prezentitajn dum la lasta IFK en Frankfurt – Słubice aŭ dum la Seminario en Pardubice. Aŭtoroj estas G. Brandenburg, M. Cuffez, A. Diemel, Z. Hinšt, L. Kovář, Lene kaj Jan Niemann, M. Trenne, T. Vašut kaj J. Matuška.

Kelkaj niaj membroj rete partoprenis la 106-an UK en Belfasto kun siaj fakaj prelegoj.

En Septembro okazis Tago de fervojo en Fervoja muzeo en *Lužná u Rakovníka*, kie membroj de ĈeFEA prezentis IFEF, ĈeFEA kaj Esperanton ĝenerale per la ekspozicio pri la agado de FISAIC kaj ĈeFEA.

Aliaj prelegoj estis farataj dum renkontiĝoj de Verden en *Parma* kaj *Grésillon*. Estis aranĝita seminario ĉe la Universitato en *Pardubice*. Kadre de projekto VERDEN estis preparata kaj dissendata enketilo pri la transporto kaj medioprotekto.

Por la nunjara kongreso estas preparitaj ĉefa prelego kaj 7 fakprelegoj / prezentaĵoj de 10 aŭtoroj el 8 landoj.

Raporto aprobata.

### **10.2 Sekretario de la Terminara Sekcio (TS)**

La Sk de TS, Guido Brandenburg raportas el la laboro de la terminologia grupo en *UIC*, precipe en ĝia rolo enigante terminojn el la glosaroj de novaj *IRS*-normfolioj en la datumbankon *RailLexic*. La influo de la angla kiel sola referenca lingvo lokanta malprecizajn, parte misgvidajn aŭ eĉ evidente malĝustajn terminojn en la komenco de la procedo traduka, kontrola kaj validiga kaŭzas malcertecon precipe en novaj kampoj, kie al nia TS mankas la fakuloj.

Inter la lingvoj de la publikigita *RailLexic* nun ankaŭ estas la slovena, danke al intensa laboro de la slovena fervojo SŽ.

La agado de TK estos flegi kaj ĝisdatigi la difinojn en la terminara sekcio de *UIC*. Al la normala laboro de la Terminara Sekcio dum kongreso kaj pere de TeKu aldoniĝis ankaŭ la Terminara reta kunveno pere de *Zoom*-abono de IFEF.

Rilate al manko de Gvidanto de FK, Guido opinias ke ankaŭ sen li/ŝi la du sekcioj povos labori senprobleme.

Raporto aprobita.

## **11. Raportoj de la komisiitoj**

### **11.1 Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA.**

La IFEF-Pr-ino Rodica Todor prezentas raporton pri sia posteno ĉe UEA kaj klarigas pri la taskoj kaj la ĝis nun farita laboro de la UEA-komitato. Retaj diskutoj okazas dum la tuta jaro, ofte ne estas rekte interesaj por la rilatoj inter la membroj de niaj asocioj. Al la virtuala UK aliĝis pli ol 70 asocioj. Okazis 2 komitatkunsidoj kiuj daŭris la tutan tagon, la Pr-ino voĉdonis por la raporto prezentita de la estraro de UEA.

IFEF havis plurajn spacojn dum la virtuala Movada Foiro, en la multaj ĉambroj ĉeestis pluraj vizitantoj de multaj landoj.

### **11.2. Rilatoj al aliaj organizoj: FISAIC; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IKEF**

FISAIC: bonaj rilatoj, IFEF estas membro de FISAIC kaj la reprezentanto partoprenas regule la kunsidojn.

La 21-an de marto 2021 okazis virtuala renkontiĝo kun la teknikaj prezidantoj de FISAIC, pluraj temoj estis pridiskutitaj. La flugfolio kun informoj de FISAIC aperas en la 3 laborlingvoj uzataj, estas libera loko ankaŭ por aldoni al ĝi Esperanton.

SAT: interrilatoj de membroj de ambaŭ asocioj, multaj niaj membroj estas ankaŭ membroj de SAT. Interŝanĝo de la bultenoj.

ILEI: kun ĝi estas bonaj rilatoj, membroj de ILEI partoprenas la kongreson kaj zorgas pri la E-kursoj. Kunlaboro pere de Kristin Tytgat kaj Luigia Oberrauch ankaŭ por la projekto “Erasmus+,” kaj la venonta kongreso en Belgio.

UMEA: personaj kontaktoj de la du prezidantoj, interŝanĝo de publikaĵoj.

ISAE: ne klara situacio estas en la asocio, estas problemoj pri agado kaj

reorganizado.

TAKE: bonaj rilatoj, ili ĉiujare proponas fakan eldonon pri konstruadoj. André Grossman partoprenis la virtualan plenkunsidon kaj konfirmis la interrilaton, invitis la IFEF-membrojn viziti la retpaĝon de TAKE por elŝuti la bultenojn pri konstruado.

IKEF: la Pr Ĉielismo ĉiam informas pri la agado en diversaj kampoj, li estis proponita de ĈEL kiel referenculo de ĈFEA por IFEF, sed problemo estas ke ili ne respondas al niaj mesaĝoj.

### **11.3. Raportoj de la laborgrupoj**

La pandemio ne permesis multajn agadojn kaj renkontiĝojn, tamen kelkaj okazis.

Pri eksteraj rilatoj jam venis raportoj, same pri la internaj rilatoj.

Rilate historion kaj arkivon Jan Niemann ĉiam plendas ke li ne ricevas informojn, kvankam en la jarraporto ĉiuj skribas ke ili kolektas materialon. Verŝajne l.a. konservas por si mem sen transdoni al IFEF. Oni faras proponon inviti la l.a. kunveni en *Zoom*-kunveno. La Sk informas pri la arkivado de bultenoj kaj invitas ĉiujn landajn asociojn sendi bultenojn jam en ciferecigita sistemo, por aldoni ilin en la IFEF-paĝon kaj ankaŭ en Bitarkivon, en Hispanio.

La grupo pri informado daŭre nutras la IFEF-paĝon kaj regule aperigas informojn en la sociaj retoj. L. Hakl instigas sendi materialon pri la kunvenoj kaj renkontiĝoj antaŭ la okazo por reklami pri ili, kaj poste sendi raporton kun fotoj. Nia kongreso estis sekvita pere de reta radio "EsperRadio" starigita en Italio. La Sk sendis al la kunordigantoj fotojn kaj videojn, kvar elsendoj informis pri la diversaj momentoj de la kongreso. La Ks traktis la temon de la ifef-forumaj listoj, ĉar ne multaj aktivas en ili kaj multaj ne aliĝis. Oni proponas aligi ĉiujn IFEF-membrojn: se ili ne deziras resti en la listo, ili povos malaliĝi.

### **11.4 Fakdelegitoj ĉe UEA**

La posteno aperas nur surpapere, fakte UEA ne zorgas rekte pri la delegitoj. IFEF proponas al UEA ke IFEF estu la referenca asocio pri fervoja fako.

## **12. Elektoj**

### **12.1 Estrarelekto**

Estis formita elekto-komisiono, la estrar-kandidatoj foriris el la salono.

La Ĉk prezidis la balotojn kaj je la fino li prezentis la raporton pri la elekto. La nuna estraro estas denove elektita por la venonta trijara oficperiodo. Raporto detala alvenis de la Ĉk.

### **13. Venontaj kongresoj**

#### **13.1 Konfirmo de la invito al la 74-a IFK en 2023 (Belgio).**

BAFE invitis IFEF kongresi en Belgio en la jaro 2023. Estis akceptita kiel kongresurbo Antverpeno. La postkongreso okazos en *Charleroi* kaj ĉirkaŭaĵo (*Namur*, k.a.). La LKK prezentis filmon kaj informojn, la prezoj de la hotelo kaj ekskursoj venos en aŭtuno ĉar ankoraŭ ili ne estis fiksitaj pro necerteco en la nuna politika situacio je internacia nivelo.

#### **13.2 Elekto de la lando por la jaro 2024 Slovakio**

Pro manko da respondoj de Serbio por organizado de IFK en la jaro 2024, oni kontaktis la slovanan organizanton por certigi pretecon ĝin organizi. Li konsentas organizi IFK-n 2024 en Slovakio, kun helpo de nia IM Magdaléna Feifičová kaj ĉeĥaj IFEF-membroj. **13.3 Propono pri la jaro 2025 Italio**

La Sk prenis la taskon esplori pri ebleco kongresi en Italio en la jaro 2025.

#### **13.4 Propono pri la jaro 2026 Serbio**

Post la decido reorganizi la vicojn de la kongresoj en la venontaj jaroj, Fervojista Esperanto-Societo en *Niš*, Serbio, proponas sin por organizi en Serbio kongreson de IFEF. La estraro sugestis ĝin okazigi en la jaro 2026. La Societo estas oficiale registrita organizaĵo de esperantistaj fervojistoj.

### **14. Movadaj Aferoj**

Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF (prokrastita dum la Movada Forumo)

#### **14.1 Strategia laborplano**

Parolante pri la Strategio de IFEF por la jaroj 2021-2023, la Pr-ino prezentis detalan programon pridiskutitan kun la agentejo Kosmo pri la EU-projekto “Erasmus+” Verden, kies temo estas “Daŭripova evoluo kaj transporto”. Ĝi postulas kunlaboradon de pluraj E-asocioj kunordigatan de UEA-TEJO. Ĝi povus esti bona okazo por kunlabori kadre de UEA kaj havi rilatojn kun la junuloj de TEJO. La projekto estas financata de EU. Klarigoj kaj aliaj temoj pri IFEF estos diskutitaj dum la kunveno de Movadaj Aferoj de IFEF.

## 15. Eventualaĵoj - Libera diskutado

Pro la organiza laboro de la kongreso oni transdonas Honoran Diplomon de IFEF al jenaj kunlaborantoj:

S-ro Petr Chrdle,

S-ro Ondřej Šmehlík,

S-ro Jaroslav Matuška,

S-ro Ladislav Hakl,

Pro la grava kunlaboro kaj la plurjardeka agado en la Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio, oni atribuas al s-ino Anna Abelovská la Honoran Membrecon de IFEF.

Manke de aliaj intervenoj, la Pr-ino fermas la kunsidon.

*Monte San Pietro, 30.05.2022*

**Vito Tornillo**, sekretario IFEF

---

## Ĉasi krokodilojn en bohemiaj arbaroj

La trajno al Prago ankoraŭ atendas sian foriro-horon dum mi sidas respirante en la klimatizita vagono kaj pensas pri la pasintaj kongresaj tagoj. Ili estis tagoj varmaj je atmosfero kaj varmaj je temperaturo – ne imageble por germano ĵus vekiĝinta el vintra dormo kaj alveninta kompreneble kun la plej dikaj vestaĵoj el la hejma ŝranko. Nur tri ĉemizoj iel konvenaj troviĝis en la kofro, portataj kun kaŝa espero ne tro ofendi la nazojn de la kunkongresanoj.

La kongresprogramo sekvis la tradician koregrafion kun fakaj kaj turismaj elementoj, ekskursoj kaj vesperoj. Do kio okazis unue kaj kio laste?

Unue Anna Abelovská abelece ĉirkaŭzumis nin en la akceptejo zorgante por senerara provizado per dokumentoj, kuponoj kaj ĉambroj. Laste ŝi faris same en la hotela enirejo adiaŭante nin kun varmaj vortoj kaj donacamasoj.

Kaj intere – ni ĝuis kaj kleriĝis. Kleriga certe estis la abunda serio de fakprelegoj pri historiaj (nostalgiaj) kaj estontecaj (kuraĝigaj) aspektoj de la fervojoj, kleriga la paroliga Esperanto-kurso de la sperta Kristin Tytgat - malfacila tasko sub kondiĉoj de ne ĉiam fidinda programsinsekvo.

Kleriga ankaŭ estis la brila prezento de la gastiganta urbo *Beroun*

transprenita de Petro Chrdle, kiu kvankam ne *Beroun*-ano tre bone konas ne nur la urbon sed pli bone eĉ la riveron kiu ĝin trafluas.

Klerigan deserton mi nomus la ekskurson al la nova centra regejo de Prago, parte funkcia - parte en konstruo, sed jam hodiaŭ postulanta respektplenan mallevon de la voĉo ne nur en la salono de la trajntrafikistoj. Apartan dankon meritas Jaroslav Matuška, kiu malfermis por ni la pordon al tiu signalteknika sanktejo kaj brave interpretis niajn malfacilajn demandojn.

La tradicia tuttaga ekskurso kondukis nin en la historion de Bohemio kaj de ĉeĥaj lokomotivoj – iom kleriga sed ĉefe amuza programero laŭ mia opinio. *Křivoklát*, fortike aspektanta sed neniam serioze sieĝita, servis kiel ĉaskastelo al la bohemiaj dukoj kaj reĝoj. Hodiaŭ ĝi servas kiel filmkuliso kun plasto-ŝinkoj, artefarita nebulo kaj grandioze kostumitaj aktoroj: „Paŭzo! Paŭzo ĝis tiuj turistoj estas malaperintaj!“. Mirigaj la biblioteko, la kapelo, la karceroj kaj diversaj turmentiloj. Dramaturgie impresa ankaŭ la kulmina sceno en la malluma gastejo: Pro haro la titolo de tiu-ĉi raporteto estintus „kongresanino de horloĝo mortbatita“. La mezepoko estis kruda kaj kruela tempo.

Mi ne vetus ĉu la tereno de la fervoja muzeo en *Lužná u Rakovníka* estas pli granda ol la samnoma vilaĝo. Ĉiakaze ĝi estas enorma kaj la fervojaj veturiloj sennombraj, almenaŭ por nepreparita turisto. Dum mi laŭiris unu el la eksprestrajnaj vaporlokomotivoj povante pasi ĝin nek antaŭe nek malantaŭe mi havis du demandojn: Ĉu oni konstruis la provizejan halon konvenan por la lokomotivo aŭ inverse kaj kial la modernaj elektraĵoj kaj dizelaj gefratoj kompare efikas tiel banalaj. Ambaŭ demandojn ankaŭ la gvidanto Ladislav Hakl ne sukcesis respondi kontentige.

Sed ni direktu la atenton al ĝuo kaj amuzo, al la ampleksa distra programo kun preskaŭ ĉiuvespera muziko. Regalis nin la senproblema trupo jam konata el Vroclavo, kie la okopo akompanis nin dum la odra ŝipekskurso. Faris tion ankaŭ latunblovantaj rondĉapuloj per ĵazmuzika ŝtormo kun akrobataj elementoj, vilaĝane kostumita grupo kun biertendaj kantoj kaj la „Muziknotetoj“, gaja ensemblo, pri kiu ankoraŭ nun en retrospektivo mi miras: Eble kvardek gejunuloj, antaŭ la pordo ankoraŭ en sovaĝa perturbo de lerneja klaso, enirante la salonon sekvis

striktan planon kaj ofertis perfekte aranĝitan, dinamikan, kompaktan, senpaŭzan trikvaronhoron. Enkondukoj kaj komentoj estus fuŝintaj la fluon. Ĉiakaze ne necesis kompreni la tekstojn. Probable temis pri la aĝtipaj fanfaronoj de la knaboj kaj incitetoj de la knabinoj. Sed vere admirinda estis la komuna prezento de kumulitaj individuaj talentoj. Kiom da ekzercado, trejnado, disciplino, sindonemo estis necesaj por atingi tiun nivelon?

Nelaste sed tamen laste mi laŭdu la orgeniston de Sankta Jakobo. La ŝanco observi orgeniston „dum laboro“ estas malofta. Kutime lia loko ja estas sur la balkono super la kapoj de la preĝantoj. En Sankta Jakobo la klavaro estas dividita disde la orgenflutoj kaj direktas ilin ĉu magie ĉu elektronike el distanco. Tiu unika okazo ebligis al ni vidi kiel eblas logi orkestron el unu sola instrumento, kiel aŭdigi koncerton kun baroka pezo, kiel ludi samtempe tri melodiojn kun akompano: per du piedoj kaj du manoj kun po kvin fingroj. La fina komuna halelujo ankaŭ celis festi la orgeniston.

Klerigon kaj amuzon ni traktis. Ni ne tute forgesu laboron. Okazis estrarkunsido(j), komitatkunsido kun (re-)elektoj, kunvenoj de faka komisiono kun la fake aplika kaj la terminologia sekcioj. Ĉiuj sekvis siajn striktajn planojn kaj alportis la esperitajn rezultojn sen vere viglaj diskutoj.

Iom ŝanĝis tion la Movadaj Aferoj lokitaj en la lasta komuna posttagmezo, dum kiu tamen trarilisis la teruraĵoj okazantaj ĉe la proksimaj ukrainaj najbaroj kaj kiujn kun singarda solidareco komentis la flago sur la titolpaĝo de la federacia bulteno. Ĉu tio ne kontraŭas la statute preskribitan neŭtralecon, leviĝis la demando. Neŭtraleco ne signifas senvorte akcepti ŝtatan agreson kontraŭ internacia juro, estis resume la respondo. Ne temas pri kondamni alinacianojn sed kondamni militon kaj esti sur la flanko de ties viktimoj.

Laŭdojn kaj dubojn provokis la projekto VERDEN, surtrakigita komune kun aliaj asocioj kaj kunordigata de UEA – laŭdojn, ĉar ĝi per la daŭripovo trafas la ĝustan temon kaj tiel sukcesis atingi subtenon kiel Erasmus-projekto, dubojn ĉar ne klaras kiun intencon ĝi krome volas realigi. Ĉu ekzemple la enketo pri fervojoj kaj daŭripovo servu kiel bazo de esploroj kaj celas rezultigi konkretajn sugestojn? Ĉu la rete alirebla



datumkolekto pri fervojaj vojaĝoj kun biciklo povas esti fidinda fonto por plani tiajn entreprenojn? Ĉu la konscio pri daŭripovo influas la decidon de la kongresanoj kiel atingi la kongreslokon? Finfine la projekto estu pli ol ondeto de ŝtono ĵetita enakven. La prezidantino promesis pliajn klarigojn.

La koronaviruson fuŝintan du ĉeestajn kongresojn de IFEF ankaŭ 2022 ne eblis forgesi – malpli pro la diferencaj reguloj pri masko kaj distancoj en gastiganta Ĉeĥio kaj la landoj de la kongresanoj. Estis la sorto de la bedaŭrinda Ladislav Kovář, kiun kaptis tiu malbenita estaĵo ĝuste en la plej malkonvena momento en la semajno antaŭ la kongreso. Nun la LKK-prezidanto sidis en sia hejma karceri, povis sekvi jen tiun programeron sendatan en la retbabilejon kaj amariene akcepti la resaniĝajn dezirojn de la bonhumoraj kongresanoj.

Kara Ladislav, ni danke ricevis viajn salutojn en la kvina kongresa bulteno kaj ĝuis la kongreson ĉiam konsciante pri via rolo en ĝia preparo.



*Rodica bonvenigas novan honoran membron IFEF.*



*Bodo kaj Andrea estas ĉiam deĵorpretaj.*



*Tie ĉi la birdeto!  
Liba baraktas por bona bildo.*



Movadaj aferoj.



*Dum Kristin ankoraŭ prezentas la urbon de la 74-a IFK, Vito jam ĉion malkaŝas en Facebook.*



*LKK de la 74-a IFK transprenas la flagon, Kristin ne efikas entute feliĉa.*

## Guido Brandenburg

Fotoj: Guido Brandenburg.

Multaj aliaj fotoj en:

<https://us.zonerama.com/FISAIC1/1000004759?count=22>

Filmraporto troviĝas en: <https://youtu.be/ZkXAQu5X68w>

## Postkongresaj tagoj (12.05. - 15.05. 2022)

Parto de kongresanoj translokiĝis per trajno la 12-an de Majo el kongresa urbo *Beroun* al urbo *Pardubice*. Tie komenciĝis nia postkongresa programo. Unue ni atingis hotelon *Labe* kaj post tagmanĝo ni ekiris al centro de la urbo, kie oni konservas unikan historian komplekson, kiu konsistas el malnova urbo kaj kastelo, kiuj estis

konstruataj ĉefe en du stiloj – la gotika kaj la renesanca. Dum la ekskurso ni vizitis ankaŭ librocentron „U Vokolků“. Tie ni vizitis malgrandajn ekspoziciojn dediĉitajn al J. A. Komenský (Komenio) kaj al unuaj ĉeĥlingvaj libroj. En la librocentro okazis ankaŭ planita renkontiĝo kun esperantistoj el *Pardubice*.



Dum promeno en *Pardubice*.

La duan tagon ni ekveturis al urbo *Litomyšl*, kiu apartenas al monda heredaĵo de *UNESCO*. Tre bela kastelo konstruita en la 16-a jarcento, urba placo de Smetana ĉirkaŭata de multaj historiaj domoj kun tute konservita arkaro sur ambaŭ flankoj faras el la urbo tre agrablan lokon. En la urbo ankaŭ naskiĝis muzika komponisto Bedřich Smetana. Post tagmanĝo ni daŭrigis nian veturadon al urbo *Svitavy*, kie troviĝas la Muzeo de Esperanto. Antaŭ ĝia vizito atendis nin vizito de urbodomo, kie akceptis nin vicurbestrino Ditta Kukaňová. La urbo subtenadas la muzeon kaj rilatoj inter urbo kaj muzeo estas tre bonaj. Ni trarigardis urbodomon, trairis tra urbocentro kaj atingis muzeon, kie jam atendis

nin sinjorino Libuše Dvořáková kun membroj de E-klubo de *Svitavy*. Ŝi prezentis al ni prelegon pri historio de la muzeo.

Dum veturado reen al *Pardubice* ni vizitis „Herbejeton de rozoj”. Nun tie estas memoraĵo de ekzilantoj kaj elmigrado el nia lando.



...vizitante E-muzeon en *Svitavy*.

La 14-an de Majo ni komencis nian ekskurson sur monteto *Chlum*, kie la 3-an de Julio 1866 okazis „batalo ĉe Hradec Králové” inter prusa kaj aŭstria-saksia armeoj. Prusoj tiam venkis. La batalo estis la dua plej granda batalo de la 19-a jarcento. Ĝis nun restas tie pli ol 480 memoraĵoj, tombejoj ktp. Pli plezura estis nia vizito de Muzeo de sekuriga kaj telekomunika tekniko en *Hradec Králové*. Por ni fervojistoj tre interesa loko, sed ankaŭ nefervojistoj havis eblecon vidi, kiel funkcias fervojo.

Poste ni veturis al la „Tendaro de Komenio” en *Běleč*. En tiu ripozloko ni paŭzis kaj tagmanĝis.

En najbara vilaĝo *Krňovice* troviĝas vilaĝa subĉiela muzeo, kiu donis al ni eblon vidi, kiel vivis niaj prauloj antaŭ cent/ducent jaroj. La muzeo

ankaŭ prezentas indulgoplenan naturamikan mastrumadon en kamparo. Lasta nia vojo gvidis nin al *Třebechovice*, kie estas videbla mondfama ligna, movebla betlehema sceno (kripfiguraro), kiun admiras multe da vizitantoj. Ĝin konstruis tri lignoskulptistoj J. Probošt, J. Kapucián kaj J. Friml. Ilia laboro fariĝis mondfama. Do ankaŭ ni admiris ĝin. Poste ni revenis al *Pardubice*.

Mi esperas, ke la tuta ekskurso plaĉis al ĉiuj partoprenantoj kaj ke ili havis novajn travivaĵojn.

**Ladislav Haki**

## Stato de la fervojo en norda Skandinavio (2-a parto)

La fervojlinio de *Älvsbyn* al *Piteå* estas jam delonge fermita por pasaĝeroj. disponeblas ja busoj. Sed ekde la jaro 2016 ankaŭ busoj ne plu estas pageblaj per fizika mono. Pro la disfalo de la fervojo, en multaj urboj la busa stacio transprenis la rolon de la fervojstacio kiel centro de aktiveco. Ekzemple oni vidas ĉiutage samajn ulojn tie. Ili neniam prenas iun buson, ĉar ili ne estas vojaĝantoj, sed senhejmuloj kaj narkotaĵemuloj. En la busa stacio en *Umeå* oni povas aĉeti trajnbiletojn, ĉar la aĉeto ne eblas en la apuda fervojstacio. Pli ĝuste dirite, tio ankoraŭ eblis kiam mi lastatempe vizitis la urbon antaŭ ĉirkaŭ 3 jaroj. Sed ĝisnune neniu pruvis ke la disfalo, aŭ laŭcela detruo, jam atingis sian finon.



Alveno de trajno el *Narvik*.\*

Dum la lastaj 40 jaroj oni forigis preskaŭ ĉiujn noktotrajnojn en Eŭropo. Surprize du noktotrajnoj teorie restas en Svedio. Ili iras de *Göteborg* al *Luleå*, kaj de *Stockholm* al *Narvik*. Biletojn ne plu eblas aĉeti, kaj pro fermo de la landlimo la iama trajno al *Narvik* iras nur ĝis *Kiruna*. Krom tio la iama posedanto "SJ" vendis la trajnojn al el nenio aperinta nova kompanio "VY".

Komence de 1950-aj jaroj, la fervojon en Svedio prizorgis unu

kompanio nomita *SJ*, kun pli ol 50 000 deĵorantoj. La kompanio posedis la trakojn, trajnojn, kaj staciojn. Alimaniere dirite, ĝi posedis aŭ dungis ĉion kaj ĉiun bezonatan por funkciigo de la fervojo. Nun la kvanto da deĵorantoj estas malpli ol 3 000. Krom la drasta malpliigo de la totala kvanto, oni ankaŭ ŝanĝis la konsiston. Anstataŭ dungi laŭ kapablo kaj volo fari bezonatan laboron (prizorgi teknikaĵojn, vendi biletojn, esplori plibonigeblojn koncerne sekurecon, rapidon, koston, daŭripovecon ktp), oni dungas laŭ pure ideologiaj kriterioj kiel ekzemple sekso. Kion la restantaj deĵorantoj kapablas fari? Pli malpli nenion ol arogante sciigi la memkompreneblaĵon: "Ni ne vendas biletojn ene de la trajno. Tio estas via respondeco kaj via problemo." *SJ* ne plu posedas la trakojn nek la staciojn. Eĉ la plejmultajn trajnojn ĝi ne plu posedas. Eble ĝi posedas la povon per sia poŝtelefona apo (supozeble programita fare de iu ie en la mondo fore de Svedio), la povon decidi pri vendo de biletoj. Kiu faras la gravan teknikan laboron pri la veturiloj kaj trakoj? Plej ofte neniu, alimaniere iu ulo el iu aparta firmao. Iam "SJ" estis mallongigo de "Statens Järnvägar" ("fervojoj de la ŝtato"). Nun "SJ" estas varomarko, pli precize varomarko sen varo.

Estas du laŭraporte profitdonaj fervojlinioj en Svedio. Aŭ almenaŭ ili estis profitdonaj antaŭ la koronavirusaj restriktioj. Unu el ili estas la linio *Stockholm - Göteborg*, do la linio inter la ĉefurbo kaj la sekva plej granda urbo. Ekde la jaro 2015 la kompanio "MTR" (kun ĉefsidejo en *Hong Kong*) funkciigas trajnojn tie apud *SJ*. La kompanio ripete agreseme plendis pri manko de justa konkurenceblo en la fervoja merkato. La alia linio estas inter *Stockholm Central* kaj flughaveno. En ambaŭ kazoj, temas pri relative bonkvalitaj trakoj permesantaj altan rapidecon, kaj zorge elektitaj niĉoj en la merkato. En la lastnomita, la "sukceso" aldone baziĝas sur la obsedo de la plejmultaj svedoj kiel eble plej multe flugi. Privatuloj okupas la profitdonajn partojn de la merkato, sed kiu respondecu pri la resto?

Mi ne emas hazardludi. Kiam mi vojaĝas, mi volas fidi ke iros trajno kaj ke mi povos uzi ĝin. Kiam mi aĉetas biletan, mi volas pagi saman koston por sama distanco. Mi ne volas pagi neantaŭdireblajn hazardgeneritajn prezojn, kaj mi ne volas riski mesaĝon "ne disponeblas biletoj". Mi ne

volas ŝanĝi mian vojaĝcelon nek la tempopunkton pro manko da biletoj. Ĉu temas pri butikumado, vizito de kuracisto, dungcela intervjuo, morto de familiano, ekzameno aŭ io ajn alia. Mi volas povi vojaĝi kiam estiĝas bezono miaflanke. Kaj mi volas povi sekure reveni hejmen eĉ se iu okazajo daŭras pli aŭ malpli longe ol atendite. Mi vere ne aprezas eblon aĉeti fiksjajn biletojn kun malfiksaj prezoj por la Kristnasko dum la somero aŭ male.

En Germanio, antaŭ nelonge, iris almenaŭ unu trajno dum horo sur la plejmultaj linioj, aŭ almenaŭ unu trajno je ĉiuj du horoj sur vere duarangaj linioj. En ĉiu fervojstacio disponeblis almenaŭ unu biletaŭtomato kie eblis aĉeti "kutiman" bileton kaj pagi ĝin per "kutima" mono, eĉ du minutojn antaŭ foriro de onia trajno. La sveda fervojo vere ne estas io pri kio oni povus fieri, nek io kion aliaj nepre imitu aŭ kopii.

\* *Historia bildo (jaro 2017) pri alveno de trajno el Narvik, malfruiĝinta je pluraj horoj, al Stockholm, antaŭ kronvirusaj restriktaj kaj antaŭ vendo al "VY".*

**Taylor Hammerschmied**

---

## **Aŭklando bonigas siajn ligojn al flughaveno**

La Transporta Agentejo de Nov-Zelando malfermis ricevon de proponoj por leĝer-rela projekto konstrui novan 24-kilometran linion kiu konektos la urbocentron kun la flughaveno en *Mangere* kun 18 proponitaj haltoj. La linio estos plejparte surfaca sed kun subteraj partoj. Momente la ege intensiva flughavena servo estas prizorgata de dizelaj busoj. La popolo de Aŭklando kredeble kreskos ĝis du milionoj (40% de la landa sumo). Jam estas planoj por longigi la linion de la urbocentro sub la havenon *Waitemata* ĝis la rapide kreskantaj kaj popularaj antaŭurboj de la norda marbordo, inkluzive de la prosperanta urbo *Takapuna*.

**Stefan MacGill**

---

## **Kio estas VERDEN?**

Tiu demando aperis dum diskuto en IFEF-kongreso en *Beroun* enkadre de Movadaj aferoj. Eble oni povas aldoni ankaŭ alian demandon – kian celon ĝi havas?

Ni revenu al titolo de la projekto – „Daŭripova evoluo kaj transporto”.

Ĝi estas la ĉefa temo de la projekto kaj partneroj kunigitaj en ĝi strebas amasigi informojn, spertojn kaj ekzemplojn pri stato de fervojoj en rilato kun aliaj transportrimedoj en diversaj landoj por kompari kiel ili kontribuas al daŭripova fervojtransporto. Amplekso de pririgardataj temoj estas vasta – analizo de transporttipoj, teknikaj aspektoj, organizaj aferoj – precipe en pasaĝertransporto kaj aliaj. Per la projekto ni volas montri bonajn kaj malbonajn ekzemplojn, helpi al legantoj de rezultmaterialoj de la projekto orientiĝi en tiu ĉi komplika afero. Krom tio ĝi estas bona ekzemplo, ke Esperanto havas potencialon esti uzata en faka internacia kunlaboro.

Al kiu estas dediĉita la projektorezulto? Certe al esperantistaro kaj en optimisma kazo al fakuloj, kiuj interesiĝas pri fervojtransporto profesie. Ni menciuj ankoraŭ alian celon de la projekto. Ĝi estas financata el EU-projekto Erasmus+, ĉapitro Edukado de plenkreskuloj, parto KA2 – „Ŝlosilkampanjo“ – Kunlaboro inter organizaĵoj kaj institucioj. Per kunlaboro je la projekto de pluraj partneroj (UEA, IFEF, BEMI, ktp) la projekto plenumas tiamaniere celojn de Erasmus+.

verden 

**Ladislav KOVÁŘ**

## **La venontjara invito de BAFE**



**La 74-a IFEF-kongreso  
en Antverpeno – Belgio  
6-a ĝis 12-a Majo 2023**

**Postkongreso en  
Valonio 12-a ĝis 14-a  
Majo 2023**

Temo de la kongreso: *Transporto kaj daŭripova evoluigo.*